

# la naska fasko

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero dek tri  
2009-07-15  
merkredo

## Kio okazos hodiaŭ?

**7:30 ptm: Legorondo**

**Kie: komuna salono de Cuzco**

Tor gvidos laŭtlegadon de famaj verkoj, ekzemple *La Kunularo de l' Ringoj* de TOLKIEN kaj eble *La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha* de CERVANTES. Venu kaj deklamu!

## Ne forgesu...

Se vi pruntis librojn el la NASKa biblioteketo, bonvolu redoni ilin al Liĉjo aŭ al Hoss, prefere ne pli malfrue ol en vendredo. Dankon!



## Tagmanĝa averto

Hodiaŭ inter la 11-a atm kaj 1-a ptm okazos granda pikniko kun multaj homoj ekster la manĝejo. Prefere evitu la malsupran placon kaj uzu la supran enirejon.

## NASK 2000 en la reto!



Danke al Tor, filmetoj de NASK 2000 en Sanfrancisko nun aperas rete. En la plej laste alŝutita filmeto, nia kara Grant GOODALL kantas la "NASKan repon". Aliaj filmetoj prezentas anglalingvajn intervjuojn kun lernantoj kaj instruistoj, la unuan tagon de la kursaro, parteton de la kurso de Spomenka ŠTIMEC, kaj multe pli. Tor aldona aliajn filmetojn en la estonteco. Vidu:

<http://youtube.com/user/NASK2000>

## ¡Hola amigos!

Ĉu vi volas viziti Meksikon? Mi veturigos 6 NASKanojn hodiaŭ je la 2-a ptm. Nepre havu pasporton, komfortajn ŝuojn kaj monon por vespermanĝi tie. Ni vizitos la urbocentron de Tihuaná, la urbeton *Playas* kaj eble ankaŭ la filmejon de la fama filmo "Titanic". —Mar

## La tri etaj porkoj

de Koto FARMER, por Liĉjo

Kiam estis granda, malsata lupoj en la lando, la per-lup-manĝeblaj bestoj volis ŝirmi sin, kompreneble. Do, tri porkoj kunvenis solene por paroli pri tio.

Post tri horoj da solenaĵoj, ili finfine ekdiskutis la aferon tiel:

"Ĉu ni simple aĉetu pafilon kaj mortigu lin?" militeme demandis la unua porko. "Li minacas nin kaj nian vivmanieron!"

"Se ni farus tion," respondis la dua porko, "certe la parencoj kaj amikoj de la lupoj

kolerigus, kaj alvenus poste por detruĵi ĉion ĉi tie, inkluzive vian pafilovendejon. Perforto neniam uzblas, ĉar ĝi nur kondukas al pli da perforto.” La dua porko legis la broŝuron de Pac-Pilgrimanto, kiu estas legebla je la retejo [www.peacepilgrim.org](http://www.peacepilgrim.org), sed ĝis nun nur en la angla kaj hispana lingvoj, bedaŭrinde.

La tria porko, kiu posedis pli da mono ol la aliaj, diris simple, “Nu, ĉiuj devas manĝi. Do, mi mendos de la granda bestoĝardeno en Sandiego sufiĉe da manĝaĵo por lupoj (ĉu povus esti ‘Purina Lupo-Ĉao’?), kaj mi malfermos kafejon, en kiu lupoj povas kaj manĝi, kaj trinki, kaj komfortiĝi.”

Tiel “La Verda Lupejo” fondiĝis, kaj plene sukcesis, ĉar ankaŭ la parencoj de la mal-sata lupo subtenis la aferon, ĉefe pro tio, ke ili tediĝis gastigi lin.

## **Praesperanto: forgesita sed ne forgesinda**

de Neal WILEY

Dum sia juneco ZAMENHOF verkis daŭre pri sia sonĝo de lingvo internacia. Dum tiu tempo la lingvo evoluis ek de la plej primitiva formo (*jam temp' está!*), konata kiel la “1878 Praesperanto,” ĝis sufiĉe bona kaj kompleta formo konata kiel la “1881 Praesperanto.” Ĉi tiun lingvon mi iom prilaboras, kaj mi eĉ kompilas etan vortaron, kaj verkis la jenan tekston:

“La redzidaŭ está ba sa balko, de kvu ŝo potá vidi ful, kvul ŝo amá. Ro vionu del perkalaj guroj, e está bella e amiza. Kor ŝo ne jam habá la krono, ro ne ŝol amá.”

Provu deĉifri ĝin! Morgaŭ aperos traduko.

## **Ĝentila kaj lerta riproĉo**

de Ron GLOSSOP

Unu fojon, antaŭ kiam li iĝis Prezidanto de Usono en 1861, Abraham LINCOLN haltis ĉe tre malgranda restoracio en vilaĝo. Li eniris kaj mendis trinkaĵon de la kelnero. Post kelkaj minutoj la kelnero alportis al li tason de varma likvaĵo. Li trinketis unu gluton. Poste li geste alvokis la kelneron kaj diris, “Kara kelnero, se ĉi tiu estas kafo bonvolu alporti mi teon, kaj se ĉi tiu estas teo bonvolu alporti al mi kafon.”

## **Ĉielo Silentas**

de Micah BALES

La turojn de l' urbcentro  
Memoras mi kiam for  
De la tero de mia  
Junaĝo sopiranta.

Neeksplikeble kial.  
Mia lando ebena  
Ne naturas enhavi  
altegturkonstruaĵojn.

La ĉiel' de ĉi-tero  
Ne bonvenas altrudon.  
Kiel preĝejsilento  
Forpuŝas mondan bruon.

Sopiro estas tiel:  
Konstrui niajn turojn;  
Kontraŭ ĉiel' ribeli.  
Sed ĉielo silentas.

## Historio de mondfamaj nekonataj esperantistoj, parto II: Ekaterina KRAPVIZAĴOVA (1911 - 2001)

de Harold GOODMAN

Mi tute ne forgesos la momenton kiam mi unue renkontis la mondfaman, nekonatan esperantistinon, Ekaterian KRAPVIZAĴOVA.

En tiu tempo ŝi laboris kiel benzineja stevardino (angle: *gas station attendant*) en Novjorko. Dum la tago, ĝenerale, ŝi laboris multajn horojn en la benzinejo. Sed, post la laboro kutime ŝi ludis sakŝalmon (angle: *bagpipes*) en geja kabareto en la orienta urbeto kvartalo.

Mi ne ofte vizitis tiujn lokojn kvankam mi tre ĝuis miajn maloftajn vizitojn kiam mi jes vizitis ilin.

Unu tagon, kiam me manĝis lunĉon ĉe mia plej ŝatata restoracio—neniam diru neniam—mi rigardis infanon kiu ludis sur la planko. Plaĉis al mi ke li plurfoje spiritpretece ridis kaj babilis al si mem. Mi pensis ke ankaŭ mi povus freneze ludi kaj babili sed, eble mi riskus iĝi malliberulo. Kompreneble, mi laboris kiel bibliotekisto en la ŝtata biblioteko kaj mi ne volis perdi mian bonan salajron. Mi pensis ke per mia bona salajro mi povus ĉion fari. Sen mono, kion mi povus fari?

Fakte, mi ne volis sperti la senmonan vivon. Mi simple timis pensi pri tiu ebleco.

Mia onklino, Nataŝa Nekonatiĝova BILLINGSGATE, ofte murmuris ke en la vivo sen mono mankas papriko. Neniu komprenis tiun mistikan diraĵon sed ni ankaŭ pensis ke eble ŝi vere komprenas ion eventuale profundan.

Eble ne.

Eble, same kiel la resto de la familio, ŝi estis nur frenezulo.

Dum la nokto en kiu mi unuafoje rimarkis Ekaterinan, mi ne fartis tre bone.

Ĉar mi volis distraĵon mi malrapide piedradis tra la novjorkaj stratoj.

Subite, mi rigardis la signon de la kabareto.

Senpense mi eniris, pagis la kvin-dolaran kotizon kaj sidiĝis antaŭ la scenejo.

La produktisto malfermis la kurtenon kaj laŭte ekkriis: “Ĉi-tiun nokton ni havas la grandan plezuron prezenti al vi la mondfaman sakŝalmistinon, Ekaterina KRAPVIZAĴOVA, el Queens, Novjorko!”

El la maldestra flanko de la scenejo mi vidis altegan, maldikegan virinon vestitan en purpura velura nokta robo, malgranda vakera ĉapelo, kaj verdaj gantoj. Ŝi malrapide promenis al centra scenejo.

Subite, iu ekkriis, “Mi pensis ke ŝi jam mortis!”

La ĉambro silentiĝis.

Sed, la ludanto simple sidiĝis sur malgrandan tablon kaj komencis ludi la sakŝalmon. La funebraj sonoj plenigis la mallarĝan ĉambron. Kelkaj homoj eliris. Finfine, nur mi kaj la ludistino estis en la ĉambro.

Poste, mi alproksimiĝis kaj salutis ŝin.

La ludanto rigardis al mi kaj diris kun senmova vizaĝo: “Plaĉas al mi ke vi ĉe-estas ĉi tie. Ĉu vi planas ion ajn?”

“Ne, vere, mi ne havas planojn. Mi estas libera. Ĉu vi volus konversacii iomete?”

“Certe,” ŝi respondis.

Dum du horoj ŝi parolis pri sia vivo. “Mia patro estis mondfama akrobato en la Zamenhofa Lingvistika Cirko en Pollando antaŭ la mondmilito. En la cirko ni havis multajn lertajn homojn. Ekzemple, mi

bone memoras la Sinjorinon ZILBERŝTEJN, kiu povis deklami verkojn de *Shakespeare* dum ŝi rajdis biciklon sur ŝnuro inter du partoj de la tendo. Ne nur ke ŝi bone deklamis sed ankaŭ ŝi scipovis paroli helene dum ŝi rajdis. Bone, ĉu ne?”

Mi furioze kapjesis.

“Cetere, mi ne povas preterlasi la nomon de Beatrice Longfellow WITHERSPOON, kiu ĉi-nokte dancis sur elefanto.”

“Nekredeble,” mi respondis.

“Jes, ne kredeble,” ŝi grimacis.

Kial ŝi grimacus? mi pensis.

Dum kelkaj momentoj da silento mi rigardis la vizaĝon de Ekaterina.

Ŝia buŝo streĉiĝis. Finfine, ŝi murmuris, “Tiuĵ tagoj estis la plej bonaj en mia vivo.”

“Kio okazis poste?” mi demandis.

“Ho, ĉu vi vere volas scii?”

“Certe, mi volus scii.”

Ŝi tuj silentiĝis kaj subigis la kapon. Post kelkaj sekundoj ŝi parolis: “Esperanto ruinigis mian vivon.”

“Kio?” mi respondis.

“Jes, vere, la bela lingvo detruis mian vivon.”

“Kio okazis?”

Denove ŝi silentiĝadis. Poste ŝi malrapide levis la kapon, rigardis mian vizaĝon kaj parolis: “Kiam mi loĝis en Pollando mi renkontis esperantan verkiston, Rolandon Svislandon HERZEGOVINON, kiu laboris tage en la landbanko en Varsovio. Ĉiutage ni paroladis dum nia meztagmanĝtempo. Malrapide, ni iĝis amantoj.”

Mi neniam havis amanton, do mi ne bone komprenis la vivmanieron.

“Unu fojon li demandis al mi, Ĉu plaĉas al vi kuniri kun mi vidi la bestojn en la zoologia ĝardeno morgaŭ? Mi konsentis. En la venonta tago ni kune iris al la bestoĝardeno. En la ĝardeno, apud la krokodila kaĝo li petis edzinigi min. Mi vere ŝokiĝis. Ni neniam antaŭe parolis pri tiu temo. Post du semajnoj ni estis edzo kaj edzino.”

Tiam komenciĝis la problemoj.

“‘Unue,’ li diris al mi, ‘Mi nur volos paroli esperante kun niaj estontaj infanoj. Do, ni devas kunlerni la bonan lingvon.’ Mi konsentis. Mi sciis pri Esperanto sed mi neniam eklernis ĝin. Mi pensis ke, per ĉi tiu lingvo ni, la edzo kaj mi, povos interproksimigi nin kaj havi bonan edzecon.”

“Ĉiun vendredon, post la laboro, ni kune ĉeestis en esperanta klaso kun la fama instruisto, Leonardo RORŜAÑO. Iom post iom mi komprenis ke mia edzo, Rolando, iĝis zelota umisto. Li ĉiam insistis uzi la afikson -um- kun multaj verboj.”

“En ĉi tiu maniero li ruinigis mian vivon, mian feliĉecon, mian estontecon. Post tri monatoj li subite saltis sur liton kaj ekkriis, ‘Mi ne volumas loĝumi kun vi! Ni devumas disiĝumi nun.’”

“Fakte, ankaŭ mi ne volis pluigi nian parencecon. Do, post kvar monatoj ni simple eksediĝumis.”

*La NASKa Fasko* ankoraŭ bezonas viajn kontribuojn. Portu ilin piede al *Asante #127*, aŭ (prefere) sendu materialojn rete al:

**<nask.esperanto@gmail.com>**